

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

N-o 54, 16. okt. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

# Ligo de Nacioj pri Esperanto.

## Nia grandega Sukceso ĉe la Liga Kunsidantaro.

### Kiel oni fondas urbajn Esperanto-lernejojn?

Almontroj el la praktiko, prezentataj al antaŭbatalantoj por Esperanto de prof. J. Süsler, direktoro de la unua urba Esperanto-lernejo en Saaz (Ĉeĥoslovakio).

Ĉe ĉiu ideo, kiu estas enpenetranta en la cerbojn de pli larĝaj rondoj de la homa societo, laŭ mia opinio kaj firma konvinkigo estas nepre necese, ke antaŭ ĉio estu certigata la idaro. Sen certigita idaro la progresado de la ideo tute dependas de la hazardo. Tio precipe valoras ankaŭ pri Esperanto.

Ĝis nun liveras la esperantistan idaron niaj esp. kursoj en la diversaj urboj, gviditaj kaj ankoraŭ gvidataj de kelkaj entuziasmuloj kaj idealistoj. Multaj el tiuj ĉi kursoj manke de efika reklamo nur vegetadas, ĉar la publiko nenion scias pri ilia ekzistado kaj pri Esperanto ĝenerale. Tre ofte okazas, ke aliurbanoj, veninte Saaz'on kaj vidinte ĉi tie la publikan intereson pri Esperanto, plendas, ke oni en iliaj urboj en la publiko nenion aŭdas pri la internacia lingvo. La kaŭzo de tiu ĉi bedaŭrinda fakto estas evidenta: al la esp. grupoj mankas la oficiala malantaŭaĵo, la larĝa bazo; tial: estas nepre necese, ke la urboj estu interesigataj por la graveco kaj la valoro de Esperanto tiagrade, ke ili prenu sur sin la fondon de tiel nomataj urbaj Esperanto-lernejoj.

• Kio estas nun entreprenota flanko de la propagandisto, por interesigi la publikon ĝenerale kaj la urban konsilantaron speciale?

Antaŭe mi volas akcenti, ke la plej taŭga persono por la rolo de propagandisto estas profesoro aŭ instruisto, ĉar li okupas publikan oficon kaj havas el tiu ĉi kaŭzo jam de antaŭe certajn rilatojn al aŭtoritataj kaj influritaĵoj homoj en la urbo. Tiuj ĉi rilatoj al la enloĝantaro estas nepre necesaj, ĉar la propagandisto devas ĉiam kalkuli kun certa kontraŭstaro, eliranta de la t. n. nacionalistoj (radikaluloj).

Plej bone estas, se mi detale priskribos la procedon, kiun mi sekvis ĉe mia propaganda agado en Saaz kaj per kiu mi atingis vere mirigajn sukcesojn.

Unue mi ekkaptis la plej malagraban parton de mia misio, t. e. mi faris personajn vizitojn ĉe kelkaj konataj radikaluloj, ĉe kiuj mi antaŭsupozis kontraŭstaron, kaj „prilaboris“ ilin „laŭ ĉiuj reguloj de la arto“ (propagandarto, nature), fervore almontrante al faktoj kaj serioze argumentante, sed ne fanfaronante. Mi devas konfesi, ke ne estis facila laboro ilin konvinki almenaŭ tiagrade, ĝis ili promesis, ne kontraŭparoli en la koncerna kunsido de la urba konsilantaro.

Poste mi ricevis la permeson en publika kunsido informi la urban konsilantaron pri la afero kaj doni necesajn klarigojn. Kunprenante kelkajn el miaj plej bone parolantaj adeptoj, mi faris malgrandan informan paroladon, diskutante pri la utileco de la fondota urba Esperanto-lernejo. Por ke la ĉeestantaro povu konvinkiĝi pri la facila elernebleco kaj taŭgeco de Esperanto, mi donis kelkajn parolprovojn per temoj, kiujn la ĉeestantoj mem elektis.

Mi devas diri, ke la sukceso estis neatendita. Post mallonga konsiliĝo oni decidis laŭ la propono de s-o urbestro d-ro A. Janka, ke la urba konsilantaro en principo ne estas malinklina fondi urban Esperanto-lernejon kaj komisi mian moŝteton per ĝia gvidado. Samtempe mi ricevis de la s-o urbestro la ordonon starigi provizoran statuton (regularon).

Havante la decidon pri la starigo de la lernejo, mi nun anoncis per grandaj afiŝoj, ke mi faros — okaze de la malfermo de la urba Esperanto-lernejo — publikan paroladon pri la internacia mondhelplingvo Esperanto.

La parolado okazis, kaj partoprenis pli ol 600 personoj el ĉiuj rondoj de la enloĝantaro. La entuziasmo, kaŭzita per la parolado, estis tiel granda, ke el la anonciĝintoj mi povis formi ses paralelajn kursojn.

La lernejo estis lokigata en la urba komerca lernejo, kiu disponigis du instruejojn. La kursoj komenciĝis je la 15-a de septembro 1920 kaj daŭris ĝis Kristnasko. Post Kristnasko okazis novaj kursoj, kiuj finiĝis je Pasko; kompreneble kelkaj el tiuj estis jam kursoj por progresintoj. Post Pasko estis ankoraŭ tri kursoj, daŭrintaj ĝis la 1-a de julio. Por atingi certan sammezurcon, mi dispecigis la anonciĝintojn laŭ la lingvaj konoj kaj laŭ la aĝo.

En la nuna instruada jaro komenciĝinta je la 15-a de septembro 1921, mi povis malfermi kvar kursojn, nome: 1. kurson por partoprenantoj kun romanaj lingvokonoj, 2. kurson por t. n. unulingvuloj, 3. kurson por pli aĝaj personoj, 4. kurson por progresintoj. En nenun kurson mi akceptis pli ol 15 personojn, por havi plejeble grandan sukceson. Ĉiu partoprenanto pagas por la tuta trimonata kurso 50 ĉ. kr.

La ekzemplo, donita de mi, jam trovis imiton. Kiel mi aŭdis, la 6-an de septembro s-o prof. K. Truntschka el Arnau faris similan paroladon en Trautenau, kiun li estas ripetonta en Hohenelbe kaj Arnau. Pri la sukceso mi volas raportii, kiam mi estos ricevinta sciigon.

Oni imitu la Saaz'an ekzemplon ankaŭ aliloke, por ke ĉiu pli grava urbo baldaŭ posedu sian urban Esperanto-lernejon. Ĉar tiaj lernejoj estas la apogoj por la esp. movado, la fonto, el kiu la movado ĉerpas sian pluan idaron.

Antaŭ ol la ŝtato ne ĉie oficiale enkondukos Esperanton en la publikajn lernejojn, konsideru la urboj kiel sian devon fondi urbajn Esperanto-lernejojn!

### Nia grandega Sukceso ĉe la Liga Kunsidantaro.

En la dua numero de „Nova Tagiĝo“, monata organo de la Interpopola Rondo Esperanta ĉe la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj, s-o Ĉikao Fujisaua donas interesan raporton pri tiu temo, kiun ni ĉi-sube represas:

Laŭ sufiĉe fidindaj sciigoj de kelkaj jurnaloj, la prezidanto de Usono s-o Harding, esprimis, ke la lingvo oficiale uzota ĉe la venonta Washington'a Konferenco estu sole la angla lingvo. Aŭdinte ĉi tiun neagraban deklaron, la franca registaro kolerplene protestis, ke la franca lingvo ĉi-okaze ne devas perdi sian ĝisnunan superan pozicion kiel internacia komprenigilo diplomata. Tiel komencis akriĝi la lingva disputado sur internacie granda skalo.

Krom tio, dum la naŭa kuneveno de la Kunsidantaro, grafo Gimeno, hispana delegito hispane parolis emocie kriante, ke hodiaŭ la unuan fojon

„Germano?“ angle demandis la fremdulo per obtuza voĉo. „Franco? Italo?“

„Kion vi bezonas?“ ruse demandis Mateo. „Ĉu eĉ ĉi tie oni ne donos al mi minuton da ripozo?“

Ili interŝanĝis ankoraŭ kelkajn frazojn. Ambaŭ voĉoj sonis kolere kaj malamike . . . La fremdulo malrapide mallevis la branĉon, la arbetojn kunigis, kaj la viro malaperis . . .

Li malaperis, kaj liaj paŝoj iom post iom silentiĝis . . .

Mateo rapide sin levitis sur kubuto kun sento de timo.

Li foriris? Li pensis. Sed kio okazos poste?

Kaj li ekhavis la deziron revenigi la viron. Sed tuj poste li pensis, ke ne estas eble lin revenigi kaj ne penvaloras. — Tute egale, li ne komprenos eĉ unu vorton . . .

Li aŭskultadis la iom-post-ioman silentiĝadon de liaj paŝoj, kiuj baldaŭ estis jam tute ne aŭdeblaj, nur la arboj ion murmuradis antaŭ tagiĝo en la densiĝinta mallumo

Baldaŭ de super la maro alŝoviĝis nebula nuboj, kaj komenciĝis senbrua varmeta pluvo, kiu baldaŭ ĉesis, sekvata de akva gutado en la foliaro de l' parko.

Tiun gutadon aŭdis komence du homoj en la Centra Parko, sed poste nur unu . . .

La alian la matenruĝo trovis pendanta sur unu el la gutantaj arboj kun terure bluiĝinta vizaĝo, kun rigida vitreca rigardo.

Tio estis la sama viro, kiu estis disŝovinta la arbetojn kaj alrigardinta la tie kuŝantan Lozisĉanon. Nia senlingvulo la unua vidis lin, kiam li matene levigis de la tero pro frostotremo, pro malsekeco, pro angoro, kiu peladis lin pluen.

(Daŭrigota.)

### La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Ŝidlovskaja.

(56-a daŭrigo.)

Starante sen ĉapo kaj rigardante al la stelplena ĉielo, li kun korpremo ripetis la konatajn vortojn de l' vesperaj preĝoj. La ĉielo pace brilis per siaj fajretoj en la senfunda bluaĵo kaj aspektis fremda kaj malproksima

Mateo ekĝemis, singarde metis apud si la pecon da pano, kiun li la tutan tagon kunportis, kaj kuŝiĝis en la arbetojn.

Ĉio silentis, ĉio estingiĝis, ĉio ekdormis sur la placo, en la zoologia ĝardeno kaj en la parko. Bruetis nur la akva flueto kaj ie en kaĝo ekkriadis nokta birdo kaj en arbetojn moviĝadis la blanka figuro, de tempo al tempo murmuretante en sonĝo ion malgajan kaj kolerplenan, eble preĝon, eble plendon kaj malbenon

La nokto daŭrigis sian kuradon super la tero. Eknaĝis en la alta ĉielo blankaj nubetoj, tute similaj je niaj rusaj. La luno subiris malantaŭ la arbojn; fariĝis pli freŝe kaj iom pli lume. Sentigis malsekeco de l' tero.

Tiam okazis io, kion Mateo ne povis forgesi en la daŭro de sia tuta vivo. Kaj, kvankam li ne povis opini sin kulpa, tamen ĝi kiel ŝtono ŝargis poste lian konsciencon

Li estis endormiĝanta, kiam subite la arbetojn disŝoviĝis, kaj viro haltis super li, rigardante en lian noktan rifuĝejon.

La horo estis griza, krepuska. Mateo nebone vidis la vizaĝon de la viro. Tamen lia memoro

konservis la impreson, ke la vizaĝo estis pala kaj ke la grandaj okuloj rigardis malgaje, dolorplene.

Evidente tiu viro ankaŭ estis nokta vaganto, iu malfeliĉulo, kiu kredeble ne spertis feliĉon en la lasta tago nek en multaj pasintaj tagoj kaj kiu hodiaŭ ne havis eĉ malgrandan moneron, por pagi la dormolokon! Eble li ankaŭ estis senlingvulo, iu malriĉa italo, iu el tiuj, kiuj ope venas ĉi tien el sia benita lando, malriĉaj, malkleraj, simile al niaj samlandanoj, kun la sama sopiro al perdita patrujo, al patrolanda malfeliĉo sub la patrolanda ĉielo . . . Unu el la senlaboruloj, elĵetitaj de tiu granda fluego, kiu nur por mallonga tempo silentiĝas tie, kie altiĝas tiuj ŝtonaj Babelaj turoj, kie nun estingiĝis la fajroj, kvazaŭ endormiĝintaj antaŭ tagiĝo.

Eble la viron ankaŭ mordetis sopiro, eble liaj piedoj jam ne povis lin teni, eble lia koro estis superplena je angoro de soleco; eble li tute simple suferis pro malsato, kaj li estus volonte preninta pecon da pano, kiun povis doni al li Mateo. Eble li siavice povus trovi por Mateo iun rimedon . . .

Eble . . . Kio ne estas ebla? Eble ĉi tiuj du homoj fariĝus porĉiamaj amikoj ĝis la fino de sia vivo, se ili nun povus interŝanĝi kelkajn fratajn parolojn en ĉi tiu varmeta, malluma, kvieta kaj malgaja nokto en la fremdlando

Sed la senlingvulo ekmoviĝis nun sur la tero same kiel antaŭ nelonge moviĝis renkonte al li la lupoj en sia fera kaĝego. Li pensis, ke ĝi estas tiu sama, kies akran fremdulan voĉon li ĵus estis aŭdinta. Aŭ eble la ĝardeno gardisto, kiu lin forpelos de ĉi tie

Li levitis la kapon kun malamo en la animo, kaj kvar homaj okuloj renkontiĝis kun esprimo de malkonfido kaj timo.

resonas ĉe la Ligo la belega lingvo de Cervantes, kiu vibrigas la animojn de pli ol 90 milionoj da loĝantoj de l' tero. La lingvon hispanan, daŭrigis la grafo, uzas triono de la membroj de la Ligo, tiel ke la internacia kunlaborado ŝajnas al ni, hispanlingvanoj, pli facila, se mi povus utiligi ĝin ĉi tie por esprimi niajn sentojn, niajn pensojn kaj fine nian volon. Eble la manko de tiu ĉi facileco estas la kaŭzo de kelkaj malplenaj seĝoj, kion ni treege bedaŭras!

Do la urĝa neceseco de la neŭtrala komprenigilo helpa estas jam impona; ĉio puŝas fatale nian aferon antaŭen, kaj nun ĵus prepariĝis tre favoraj cirkonstancoj por la esperanta movado.

La 10-an de septembro antaŭ la prezidanto de la kunsido prezentigis grava propono pri instruado de Esperanto, subskribita de dektri diversnaciaj delegitoj. La kunsido tuj starigis specialan subkomisionon por decidi, ĉu oni povus enskribi la demandon pri Esperanto kune kun aliaj same proponitaj aferoj en la tagordon de la dua kunsido.

Post kvin tagoj, Lordo Robert Cecil, prezidanto de tiu ĉi subkomisiono koncernata, letere komunikis la rezultatojn de sia laboro al s-o Karnebeek.

Jen sin trovas la ellaborita propono pri Esperanto:

La propono 2 pri instruado de Esperanto farita de la Sudafrika delegito Lordo Robert Cecil kaj ankaŭ subskribita de l' delegitoj de la landoj:

Rumana	s-o Jonescu
Persa	s-o Emir Zoka
Belga	s-o Lafontaine
Ĉeĥoslovaka	s-o Beneš
Kolomba	s-o Restrepo
Ĉina	s-o Dan-Cal-Fu
Finna	s-o Enckell
Albana	s-o Noli
Japana	s-o Adaĉi
Venezuela	s-o Escalante
Hinda	s-o Khengary
Pola	s-o Askenazy.

La delegitoj suprenomita proponis la enkondukon de la internacia helplingvo Esperanto en la publikajn lernejojn por faciligi la rektan interkompreniĝon inter la popoloj de la tutmondo.

\* \* \*

1. La komisiono konsideras, ke ĉi tiu problemo, pri kiu interesiĝas nombro ĉiam kreskanta de ŝtatoj, indas je zorga pristudado, antaŭ ol la kunsido pritraktos ĝin. La afero estis jam lastjare resendita al komisiono, kiu prezentis mallongan raporton rekomendante al la sekretario enketon pri la spertoj kaj rezultatoj jam atingitaj en la sfero de faktoj.

2. La komisiono do proponas, ke la problemo estu enskribota en la tagordon de la sekvanta kunsido, kaj ke la sekretario preparu ĝis tiam kompletan kaj dokumentan raporton laŭ la senco montrita per la projekto de la rezolucio.

3. Laŭ deziro de la subskribintoj, la raporto de la dua komisiono lastjara same kiel la raporto de subsekretario d-ro Nitobe pri sia oficiala misio al la Praha Esperanta Mondkongreso estu komunikataj al la ligo senprokraste.

\* \* \*

La kunsido alprenis tiun ĉi proponon unuanimie, kaj nek Hanotaux nek Hymans kontraŭbatalis.

Tiu ĉi grandega venko ja markas novan epokon en nia movado, nia fincelo iom post iom alproksimiĝas, kaj ni estu ĉiam kuraĝaj kaj esperplenaj. Ni prudente kaj entuziasme preparu por nia batalo en la Tria Kunsido de la venonta jaro. —

Ni tre sincere dankas s-on Adaĉi pro lia respektinda afableco subteni nian lingvon, malgraŭ malfavora sinteno de la ceteraj japanaj delegitoj.

Li estas vere spirite internacia homo sopiranta je alta homidealo.

\* \* \*

Aliflanke japanaj eminentuloj nun restantaj en Genevo pro aferoj de la Ligo de Nacioj, eksentante en ties pleneco la netakseblan valoron de Esperanto, konsentis sendi baldaŭ al la Japana Parlamento petskribon pri la ĝisfunda pristudo de internacia lingvo Esperanto. Pri tio ni ŝuldas koran dankemon al atestimata s-o Janagida, honorinda ĝenerala sekretario de Senato. Internacie vekigis nun nova Japanujo.

\* \* \*

Laste la sekretario ricevis de la Brazila Ligo Esperantista petskribon datitan de la 10-a de aŭgusto 1921 kaj adresitan al la Prezidanto kaj al la Membroj de la Kunsido. La teksto de la Petskribo estas:

Konsiderante la neceson de ia lingvo internacia; la neeblecon solvi ĉi tiun problemon per alpreno de lingvo mortinta aŭ de ia ajn lingvo nacia, la disvastiĝo de la helplingvo neŭtrala Esperanto en ĉiuj centroj civilizitaj de l' terglobo kaj fine la aprobon, kiun donis al ĉi tiu internacia komprenigilo la plej kompetentaj personoj;

Al la Ligo de Nacioj, ni respektplene petas, afable doni moralan apogon valorplenan por

la celo de Esperanto kaj efektiviĝi ĉi tiun apogon per alpreno de rezolucioj montrantaj la servon, kiun ĉi tiu neŭtrala helplingvo donas al la daŭrigado de l' paco kaj al la bona interkompreniĝo inter popoloj.

La Konsilanta Direktoro  
Alberto Couto Fernandes.

La peto portas subskribon de 239 brazilaj eminentuloj.

## La VIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

okazos dum la IX-a Kongreso de Kataluna Esp. Federacio la 15.—17. okt. en Girona. La detala programo de la Kongreso kaj la verdikto pri la Floraj Ludoj estas publikigitaj en la oktobra kajero de „Kataluna Esperantisto“.

Estinte ano de la juĝantaro por la nunjaraj Floraj Ludoj, mi havis okazon jam konatiĝi kun la enhavo de la konkursintaj verkoj. Ĝenerale la senditajoj ne estas tre laŭdindaj, kelkaj estas eĉ malbonegaj, kvazaŭ ilin estus skribinta komencanto, kiu lernis Esperanton nur de tri tagoj. Tamen kelkaj el la premiitaj verkoj vidigas grandan fervoron kaj diligentan laboradon.

La originala versajo prikantanta amon, al kiu estas aljuĝita la unua premio kaj kies aŭtoro elektos la „reĝinon“ de la Floraj Ludoj, enhavas vere belegajn pensojn; bedaŭrinde ĝi montras, samkiel prezkaŭ ĉiuj konkursintaj poemoj, malbonan ritmon. Jen estiĝas la demando, ĉu en Esperanto ni allasu poemojn, kies opaj linioj ne havas ritmon laŭ la vortakcentoj sed posedas nur certan kvanton da silaboj. Ĉi-sekvante mi donas strofon el la menciita poemo titolita „Al Ronjo“ kaj sube provon de ĝia laŭritmigo, kiu iom malklarigas la sencon, sed ne tiom, ke ĝi fariĝus nekomprenebla.

Se mi estus de roso perla guto,  
je nokto de somero,  
kvazaŭ deca al vi ĉeltributo,  
jen mi, sur vin falinte el aero,  
min kaŝus inter viaj odorplenaj  
folioj ruĝkoloraj,  
dum la horoj de l' nokt' kvietserenaj  
dum la horoj, pro vi, parfumodoraj.  
Kun kia ĝu' mi tiam  
dolĉe ripozus en kvietesilento,  
dum min dorlotluladus vi, ĝis kiam  
surprizus nin la sun' de oriento  
kaj ĵaluze, ebrian je parfumo  
min vaporigus ĝia fajra lumo!

\* \* \*

La sama strofo laŭritmigita:

Se estus mi de roso perla guto,  
je nokto de somero,  
— konvena dec' al vi, ĉeltributo —  
jen mi, sur vin falinte el aero,  
min kaŝus inter viaj odorplenaj  
folioj ruĝkoloraj,  
dum nokt' horoj la kvietserenaj,  
dum horoj per vi delikatodoraj.  
Kun kia ĝu' mi tiam  
ripozus dolĉe en kvietesilento,  
dum min dorlotluladus vi, ĝis kiam  
surprizus nin la sun' de oriento,  
ĵaluze min, ebrian je parfumo,  
forvaporigus ĝia fajra lumo!

\* \* \*

Aliaj rimarkindaj verkoj estas scienca artikolo „Pri la Lingvaj Respondoj de D-ro Zamenhof“, laboraĵo pri „Radikoj greko-latinaj, kiujn enhavas la esperanta vortaro“ kaj „Verko pri la infana psikologio“. Ili pruvas grandan diligentecon kaj meritas esti publikigitaj en formo facile akirebla por ĉiu esperantisto.

T. J.

## Pola Esperanto Servo.

2-a Cirkulero!

Gesamideanoj!

Duonjaro forpasis depon la fondo de Pola Esp. Servo. Negranda estas la ĝis nun farita laboro. Havante nur tre malbonajn interrilatojn kun la pollanda samideanaro kaj kun malforta financa kaj morala bazo, PES estis devigata etendi sian propagandon sole en Bydgoszcz. Kun la 15-a de aŭgusto 1921 la aferoj ŝanĝiĝis. La gvidanto interrilatiĝis kun malnova s-ano s-o Chmielewski, gvidanto de Aŭtodidakta Universitato en Bydgoszcz, ul. Kordeckiego 1a, kiu ekkoninte la gravecon de PES por nia movado en Pola lando, promesis doni ĉiun ajn eblan subtenon. Dank' al tio PES havas je sia dispono vastajn ejojn, kies parton ni nun ekuzis, malfermante unuan publikan Esp. Oficejon en Bydgoszcz. Por publiko ĝi estas provizore malfermata merkredo kaj sabato de 6—8 vespere. Ĉiuj s-anoj vizitantaj Bydgoszcz-on turnu sin por informoj ĉiuhore rekte al PES, Esp. Oficejo, Kordeckiego 1a. Pluraj ejoj krom tio ebligas la starigon de pligranda esp. biblioteko kaj aranĝon de ekspozicioj, kiujn ni pli poste transformigos en konstantan „Esperanto-Muzeon“. Cetera ankaŭ la financa bazo de PES estas certigita, kio ebligas la etendon de l' propagando en tuta Pola lando. — Depost kelkaj semajnoj laboras senlace areto da entuziasmaj s-anoj, oferante ĉiun ajn liberan tempon por Esperanto.

PES konsistas el sekvantaj bone organizitaj sekcioj:

Gvidanto de PES: s-o Fr. Prengel.

Sekcio: organizo de kursoj kaj esp. ekzamenoj s-o prof. Kronenberg  
propaganda s-o Edmund Fethke  
intern. korespondo kaj biblioteko s-o Br. Szalla  
muzeo s-o Napiatek  
statistika movado s-o Edmund Fethke  
filatelisto s-o Kruszczyński.

Ĉiuj s-anoj laboras kun devizo: **Ne diskuti, sed agi!** Efektivigotaj celoj: Aranĝo de esp. ekzamenoj, propagand-paroladoj, kursoj kaj ekspozicioj, eldono de diversspecaj propagandiloj. Specialan atenton ni turnas je la propagando inter nacia gazetaro. Ne malpli grava estas la kolekto de materialo pri statistika movado. Ni posedas jam pli ol 200 adresojn de s-anoj el tuta Pollando. Ni eldonos ĉiujn adresojn en speciala adresaro. Ĉiu s-ano kiel ankaŭ la prezidantoj de esp. grupoj el Polio sendu adresojn al suba adreso. Neniu manku! Zamenhoflandanoj montru, ke ni estas pli multnombraj ol la mondo opinias! Ĉiuj helpu realigi niajn celojn. Antaŭen ĝis la fina venko!

Edm. Fethke,  
sekretario de PES.

Fr. Prengel,  
gvidanto de PES.

Adreso: Pola Esperanto Servo (Gvid. Fr. Prengel),  
Bydgoszcz, Pollando, Kordeckiego 1a.

PS. Oni respondos nur, se estos aldonata sufiĉa afranko.

## Pola Esp. Societo

ĵus forsendis sian 2-an cirkuleron:

La tagoj de la Novembra Konferenco proksimiĝas. La pola esperantistaro akiras fine siajn ĉefajn reprezentajn povojn. En libera unuigita Polujo, samideanoj el Krakow kaj el Poznan, el Lwow kaj el Warszawa, el Lodz kaj el Bydgoszcz, etendinte al si la manojn, ekmarŝos al la nova venka periodo de nia ideala penado. Ĉe tiu granda familia festo ekmanu neniurbo, kiu posedas Polan Esperanto-Societon! Krom delegitoj, venu multnombre gastoj el la lokoj, kiuj ne havas sufiĉan nombron de polaj samideanoj, por sin oficiale reprezentigi! Al la fina sukceso, al efektiviĝo de miljara homa ideo, al neantaŭvidebla glora estonteco de l' homaro, Polujo iras kun devizo: Unueco kreas forton!

Programo de la konferenco.

Lundo, 31. X.

20 h. Interkonatiĝa kunveno.

Mardo, 1. XI.

10 h. Meso por A. Grabowski.  
11—12 h. Vizito al la Mastro-tombo.  
14—16 h. Komuna tagmanĝo.  
16—19 h. Unua laborkunsido.  
20 h. Solena vespero por honoro al A. Grabowski.

Merkredo, 2. XI.

10.30 h. Vizito al la tombo de Grabowski.  
12 h. Vizito al urbaj vidindaĵoj.  
16—19 h. Dua laborkunsido. Fermo de la konferenco.  
19.30 h. Komuna teatroiro (eventuale raŭto).  
22.30 h. Adiaŭa vespermanĝo.

Delegitoj sciigu jam nun, kion ili partoprenos! Gastoj (nedelegitoj) rajtas partopreni ĉion, krom la laborkunsidoj. La akceptejo (fotografujo Studio, str. Marszalkowska 88, angulo de Żorawia) troviĝanta tre proksime de la ĉefstacidomo, funkcios la tutan tagon lunde, la 31-an de oktobro, ĝis 22 h. kaj la 1-an de novembro de 9 h. matene. Alvenantoj ricevos ĉiujn informojn. Atentante la loĝejan mankon estas rezervitaj dekkelk samideanaj loĝejoj por la 2 tagoj!

Ĉiun korespondadon pri la konferenco adresu de nun al s-o Kazimierz Tyminski, Hoza 10, Warszawa, kiu estas elektita sekretario de la organiza komitato. Ne forgesu alsendi aŭ kunpreni viajn rajtigajn dokumentojn kaj membroliston de 1-a cirkulero! Bonvenu baldaŭ kaj ne malfruigu!

La Organiza Komitato de la 1-a Konferenco.

## Ligo de Nacioj.

Laŭ gazeto „La Suisse“, Genève, okazis la 22. sept. bankedo de 20 por-esp. delegitoj de la Ligo de Nacioj, inter kiuj Wellington Koo, prezidanto de la Konsilantaro de la Ligo, Lordo Robert Cecil (Suda Afriko), belga senatano Lafontaine, Gilbert Maray, princo Arfu-ed-Dowleh, Restrepo kaj vic-sekretario Nitobe. Paroladis s-oj Wellington Koo, Robert Cecil kaj Arfu-ed-Dowleh.

## Komerco.

Komerca Ĉambro de Saumur

(depart. Maine et Loire, Franclando), 17000 loĝantoj, vinoj, grajnoj, tolo, ledoj, voĉdonis por Esperanto.

En Brno (Brünn), Ĉeĥoslovakio,

prof. Krouzil gvidas oficialan kurson en la Komerca Lernejo kaj duonoficialan en la Industria Lernejo.

## Laboristaro.

La 4-an kaj 5-an de oktobro s-o Raguère faris du propagandajn paroladojn pri Esperanto en la 1-a kaj 2-a sekcioj de la komunistarta partio en Paris.



# Tekniko.

## Grava germana Eltrovaĵo.

Eltrovaĵo de eksterordinara graveco estas prosperinta al germana inĝeniero d-ro W. Schmidt. Estas vaporforta konstruaĵo, kiu superas ĉiujn ĝis nun ekzistantajn maŝinarojn rilate ekonomion je pli ol 46%. Tio do signifas, ke la tutmonda karbokonsumo por fortoceloj reduktiĝas je preskaŭ la duono de l' nuntempa bezono, se la konstruaĵo estus ĝenerale enkondukata. La provo-maŝinaro, kiu troviĝas en la urbo Wernigerode, jam estas esplorita de aŭtoritatuloj, kiuj miris pri la movilara certeco, kiun ĝi havas malgraŭ ke ĝi laboras kun altega premo. Sed ne nur la karbokonsumo estas tiel grave malgranda, sed ankaŭ la prezo por tiu ĉi maŝino nur estas triono de tiu por maŝino konstruita ĝis nun. Ĉio en ĉio la eltrovaĵo signifas progreson en teknika kaj ekonomia rilato.

## Kuracistaro.

**Alvoko al ĉiulandaj esperantistaj kuracistoj.**  
En la faka kunveno de kuracistoj, okaze de la XIII-a Kongreso en Praha, la TEKA (tutmonda esperanta kuracista asocio) estas refondita kaj la eldonado de faka oficiala gazeto decidita. Mi petas la allĝemajn kolegojn, bonvolu min tiurilate informi.

D-ro Austerlitz, sekr. de TEKA,  
Bardiov, Slovakio.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

### Sukceso inter militistaro.

La gvidanto de la kleriga sekcio de la militista komandejo en Bydgoszcz petis tute neatendite s-anon Prengel fari priesperantan paroladon inter tieaj militistoj. La parolado okazis la 15. 9. 21. Ĉestis la tuta personaro kun pli ol 30 ĉiurangaj militistoj. La sukceso estas tia, ke kun permeso de la komandanto s-o majoro G., oni akceptis Esperanton en la komandajn programon de klerigo. Esp. kurso okazas ordone ĉiusabate de 8-9-a horo matene, parte kun ĉeesto de oficiroj. La kurson gvidas s-ano Prengel.

### La „Internacia Esperanto Fondo por malriĉaj hungaraj infanoj“

fondita de eksterlandaj esperantistoj partoprenintaj la postkongresajn festojn en Budapeŝt, petis nin komuniki la jenon:

Por la fondo donacis, kiel kreantoj de la fondo:

Geo-oj Blaise, London hung. kr. 477.—  
s-o E. Farnell, Bradford „ „ 800.—  
s-o Marcell Boubou, Orleans „ „ 200.—  
sume hung. kr. 1477.—

Pluajn sendojn akceptas la kasisto de la Hungara Landa Esp. Societo: s-o Elek Tolnai, Budapest V, Korall utca 9-II-5.

Ĉar 1 sv. fr., 1 skand. krono, 1 ŝil., 18 germ. mk. estas nun 100 kr., ĉiuj s-anoj povas facile helpi al la hungaraj infanoj.

### En Wernigerode (Harz, Germ.)

Esperanto estas instruata ĉe la Popola Altlernejo. „Wernigeroder Tageblatt“ publikigis en septembro kvin artikolojn por Esperanto.

### Grava germana Eldonejo instalas specialan Esperanto-Fakon.

La konata germana eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, kiu eldonas precipe instruilojn por lernejoj, gimnazioj kaj universitatoj kaj kiu jam eldonis kelkajn esp. librojn, nun instalas specialan esp. fakon, kun kies gvidado ĝi komisiis s-on Bernhard Köp, la ĝisnunan posedanton de „Germana Esp. Librejo“ en Leipzig. La „Germ. Esp. Librejo“ samtempe estas kunfondita kun la esp. fako de la firma Hirt & Sohn. Tiu energia apogo de Esperanto per unu el la plej konataj germanaj eldonejoj donas al nia movado en Germanio novajn perspektivojn por la estonteco, antaŭ ĉio nia movado ricevas per tio multe pli seriozan aspekton. Ni rajtas kompari la nunan apogon de Esperanto per la firma Hirt & Sohn kun la sama apogo per la firma Hachette en Paris.

### Esp. Grupo en Reims

havas kiel honorajn prezidantojn la urbestron kaj la subprefekton (distriktestron). Du kursoj. Propagando de hispanaj, italaj kaj amerikaj esperantistoj inter iliaj samlandanoj en Reims.

### La Norda Sekcio de la Pariza Grupo

(Ĝ. Lassus) aranĝis esp. kurson en la Politeknika Asocio de la XIX-a distrikto, alian en la ejo de la lernejo de la rue Philippe de Girard, trian en la ejo de la lernejo de la rue Lepic, kvaran en la Intersindikata Komitato de la XIX-a distrikto kaj kvinan en la Labora Borso.

### Pluaj Akademianoj, alligintaj al la Deziresprimo de la konataj 21:

Haller, prof. de kemio en la Pariza Universitato; Painlevé, prof. de Politeknika Lernejo, deputito, prezidanto de la konsilantaro de ministroj; Bazy, d-ro de medicino, eks-ĉefkirurgo de la hospitalo St. Jean de Dieu; Marchal, direktoro de la Franca Ontomologia Oficejo.

### Esp. Ekspozicio en Bruxelles (Belgio)

estas organizita en la grava librejo J. Luycry & Co., 76-78, Condenberg, en la centro de la urbo.

### Nova Esp. Grupo en Salt (Katalunio).

La 6-an de aŭgusto s-o instr. Konrado Domenech faris propagandan paroladon en Salt, vilaĝo apud Girona ĉe Lab. Kultura Soc. „Floreal“; sekvis kurso kaj la 18-an de septembro solena fondo de Lab. Esp. Grupo „Regeneracio“, partoprenate de la prezidanto de „Kat. Esp. Fed.“ s-o Gili Norta, de la ĉefred. de „Kat. Esperantisto“ s-o Jaume Grau kaj de s-o Delfi Dalmau el Barcelona, kiu belege paroladis. Komitato de la nova grupo: prez. Jozefo Puig, sekr. Konr. Domenech, kas. Joh. Comas, voĉdonantoj Petro Sener kaj Marg. Parramon.

### El Nederlando.

En Rotterdam praktika kurso ĉe Popola Universitato kaj nova kurso por fervojistoj (gvid. Woortman, Roskes kaj Poolen). Kurso ĉe Laborista Klubo kun 60 lernantoj (gvid. J. de Jong). En Hoek van Holland s-o Verschoofs gvidas kurson.

### La Esp. Grupo de Lyon (Franci.)

organizis la 7. okt., okaze de la Lyon'a Foiro, sub la protekto de la Komerca kaj Terkultura Asocio de Lyon kaj de la Regiono, propagandan vesperon en la Palaco de la Konservatorio. Antaŭ multnombra publiko s-o Antonelly, prof. de juro en la Lyon'a Universitato kaj prezidanto de la grupo, parolis pri Esperanto, s-o Cherbanc, sekr. de la komerca ĉambro de Tarrare, pri la praktiko de Esperanto. Tiuj paroladoj okazis sub la prezido de s-o Wlernberger, direktoro de la lernejo La Martinière, kiu salutis je la nomo de la foira komitato. En la foira palaco (stando 11, grupo 52) troviĝas esp. kiosko de s-ino Farges, direktorino de la esp. oficejo. — Publika kurso en la ejo de la Lyon'a grupo, 12, rue Alphonse Pechier.

### Kongreso de la Ligo por Instruado.

Dum la ĵus okazinta kongreso de la Ligo por Instruado (Ligue de l'Enseignement), grava kleriga organizaĵo, en Nancy s-o Rollet de l'Isle faris paroladon pri Esperanto antaŭ multnombra kongresanaro.

### Lingva Lernejo en Paris.

„Ecole l' Avenir“, 256, Faubourg St. Honoré, anoncas kurson de Esperanto en sia programo.

## Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinde, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represigi en naciaj gazetoj, aldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1-2 ekzemplerojn de la koncerna ĵurnalo la la redakcio de ET.)

### LETERO EL ESTONIO.

Tallinn, oktobro 1921.

De 10-a ĝis 19-a de septembro okazis la jara Tutestonia Industria kaj Agrikultura Ekspozicio en la ĉefurbo de Estonio: Tallinn (Reval).

Kvankam aranĝita de la Tallinn'a Agrikultura Societo, kiu estas privata entrepreno, la ekspozicio spegulis bone dislingeblan, nuancrican kaj vivan bildon pri la ekonomia stato de l'estona popolo.

La viglan intereson de la publiko — ĉ. 200 000 personoj vizitis la aranĝon — la ekspozicio meritis. Pli ol mil en- kaj eksterlandaj firmoj kolektiĝis en la multnombraj haloj kaj sesdeko da pavilonoj kaj -etoj por paca konkurado. Cetere la fakto, ke estis reprezentataj entreprenoj el naŭ aliaj ŝtatoj (Finna, Latva, Germana, Sveda, Angla kaj Franca, el Hollando, Ĉeĥoslovakio kaj Usono) indikas kreskantan translikomercon kun la rusan-landaj merkatoj.

El la plurdek fakoj mi citas la precipe bone reprezentitajn: la agrikultur-maŝinan kun anglaj, usonaj, germanaj, ĉeĥaj kaj estonaj fabrikatoj (akciaj societoj Franz Krull, Ilmarine, Tegur k. a.); la transportilan (eksterlandaj aŭtomobiloj Benz, Elite, Ford, Harry Davyson k. a.); la konstruamaterialan (unuakvalita cemento de estonaj firmoj Port-Kunda, Kalev k. a.); la montan kaj torfan fakojn (mulpromesaj branĉoj de l'estona industrio: estis prezentataj bonkvalita oleardezo, bonega torfo kun multvaloraj el ili destilitaj oleoj kaj alkoholoj); la argil- kaj kalkŝton-industriajn; la ledotanaran (ire vivipova enlanda industrio). Ankaŭ la kemia industrio liveris menciindajn ekspozitojn (en- kaj eksterlandajn). El la restintaj fakoj mi ankoraŭ citu la lignajn kun diversaj krudmaterialoj kaj ellaborajoj, kiel mebloj (akcia societo M. Luther, Marcel, M. Makarov, Massoprodukt).

Loko kaj tempo kaj eble ankaŭ la pacieneco de la legantoj mankas por eĉ nur nomi ĉiujn aliajn fakojn. Tre grava estis la agrikultura parto de l'ekspozicio. La terkulturiga fako montris: melioracion (plibonigon de l'kampoj), ĝardenarton, arbarkulturon. Al bredado de abeloj, fiŝoj, plumbirdoj, brutoj kaj ĉevaloj apartenis propra ejo. Prevaloris la Ayrshire-kaj angler-bovoj, trovitaj kiel plej bone dakeblaj en Estonio. Por ke mi ĝin ne forgesu! plej interesa kolekto da dum 40 jaroj selektiita grenospeco de grafo Berg-Sangaste altiris la atenton de la vizitantoj de l'ekspozicio.

Kiel dirite, la aranĝo estis lerta kaj kontentigis verŝajne la publikon, inter kiu troviĝis kelkaj finnaj ministroj, la ĉefo de la pretrevetura angla ŝiparo, speciale alveturintaj raportistoj de svedaj, finnaj, anglaj kaj germanaj gazetoj kaj aliaj interesitoj el la eksterlando. Ĉe la ekspozicio funkcis propraj poŝt-, telegraf- kaj radiograf-ejoj.

Dum la ekspozicia semajno la teatroj kaj koncertoj ekstre bone funkciis, ankaŭ la gazetoj aperadis en multobligitam amplekso.

Konklude, mi esperas, per ĉi-supraj linioj esti aludinta, ke ankaŭ la malgranda Estonio, ja antaŭ nelonge akceptita en la Ligo de Nacioj, maturiĝas kaj fariĝas lando kun propra valora kulturo.

H. Sakarias.

## Poloj, hungaroj, aŭstroj.

La pola marko valoris lastan semajnon en Köln jam nur 2 pfg. Tial ni estas devigataj denove gravege plialtigi niajn prezojn. Estonte ET kostos en la opa vendado po numero 25 mk. kaj en la abonado duonjare 1000 mk. Oni konsideru, ke — post la nova plialtiĝo de la afrankotarifo — ĉiu numero de ET kostos sole por papero kaj afranko ĉ. 70 germ. pfg. kaj, se ni forsendos 5-10 ekzemplerojn kune, po 45 pfg. Do la novaj prezoj kovras, post depreno de la procentaĵo por la vendinto kaj la reprezentanto, apenaŭ niajn elspezojn por papero kaj afranko.

Por Hungario la prezo altiĝos en la opa vendado al 4 kronoj po n-o, en la abonado al 125 kr. duonjare.

Por Aŭstrio la prezo altiĝos en la opa vendado al 10 kronoj po n-o, en la abonado al 300 kr. duonjare.

Abonoj, kiuj jam estas antaŭpagitaj, estos plenumataj por la malnova prezo.

## Recenzejo.

(Unuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝanĝe kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

### LIBROJ.

**COURS RATIONNEL ET COMPLET D' ESPERANTO.** Préface de Henri Barbussé. 15 : 20 cm. 208 ppg. broš. en ruĝa kovrilo. Prezo afr. 5,50 fr. sk. Havebla ĉe Fédération Espérantiste Révolutionnaire, 25 bis, rue Morère, Paris 14. 1921.

Tiun ĉi lernolibron por francilingvaj laboristoj ni recenzas ankoraŭ pli detale.

**PARVA GRAMMATICA INTERNATIONALIS IDIOMATIS ESPERANTO CUM GLOSSARIO ESPERANTO-LATINO.** (Malgranda gramatiko de la lingvo Internacia Esperanto kun vortaro Esp.-latina.) Verkita Sac. I. Blanchini. — Kolekto de „L' Esperanto“. 40 ppg. 11 1/2 : 16 cm. Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Ital.) 1921. Prezo: broš. 1 lfr.

Nun ni posedas ankaŭ gramatikon de Esperanto en latina lingvo. Tralegante ĝin mi memorigis la tempon, kiam mi sidis en gimnazio studente la belan sed malfacilan lingvon de Cicerone kaj Horatius. Ni devis lerni multajn regulojn gramatikajn kaj tiom da esceptoj, ke ni preskaŭ malesperis.

Mале nun la latinlingvaj klarigoj de la libroto diras, ke en Esperanto ekzistas nur reguloj sen esceptoj. Denove ni ĝojas pri la facileco de Esperanto.

La gramatiko, kiu tute ne estas kompletá, t. e. apenaŭ sufcinta por elementa studado, estas internacia, ĉar en ĉiu lando ekzistas multaj personoj scipovantaj la latinan lingvon ekz. pastroj, kuracistoj, juristoj, sciencistoj, al kiuj la libro — se ĝi estas bona — povus servi kiel lernolibro de la internacia helplingvo en la nuna tempo.

Bedaŭrinde ĝi enhavas preserarojn kaj gravajn gramatikajn erarojn, ekz. iri al patrujojn, patru kun sia filo kaj iliaj amikoj (anst. liaj), mi estas amata = amatus sum (anst. amor) ktp. Malbonega estas la artikolo pri prononcado. La aŭtoro skribas interalie, ke ĉ = c en coelum, cibus; c = th en greka lingvo; ŝ = sc en slo. Nenlu esperantisto komprenos tiun, kiu lernas laŭ ĉi tiuj strangaj reguloj pri prononcado. Kiel oni skribas gramatikon, se oni mem ne scipovas perfekte Esperanton? (G. Ajul.)

**LA PRINCIPIO DE LA MOVADO POR ĈASTA VIVO,** pliklarigita el ideala kaj praktika vidpunkto. 15 : 20 cm, 32 ppg., broš. Prezo afr. 0,50 f. Havebla ĉe D. Roakes, van Loostraat 68, Hago, Nederlando.

**ESPERANTO KAJ IDO.** Laŭ G. Gautherot tradukita de L. E. Meier. Popola Bibl. Esp. n-o 4. 16 ppg. 11 1/2 : 15 cm. Eldonejo: E. Rothermel, Gr. Tabarz, Thür., Germ. Prezo: broš. 1,60 mk. por Germ. kaj 2,50 mk. por eksterlando.

Ĉe la franca firma Hachette & Cie. aperis en 1910 „La Question de la langue auxiliaire internationale“ (Lea reformateurs et le schisme idiste) de Gustave Gautherot. El tiu libro, kiu estas bonega batalilo kontraŭ ido, ĉerpis Meier; li tradukis la tekston preskaŭ laŭvorte. Al ĉiu, kiu volas informiĝi pri ido, mi varme rekomendas la libron, en kiu ĉiuj idistaj argumentoj estas trafte diskuitaj kaj refutitaj. (G. Ajul.)

### GAZETOJ.

LA MARTO. Okt.

Interesa komparo inter la XIII-a kaj la I-a Univ. Esp. Kongr. Raportoj kaj ilustraĵoj pri la kongreso de Praha.

LA SEMISTO. Sabadell, aŭg.

DER ARBEITER-ESPERANTIST. Okt.

Novaj lab. grupoj en Gelsenkirchen kaj Heidenau.

ARGUSO. Organo de meksikaj esperantistoj. N-o 1, sept. — Ni tre ĝojas pri la apero de esp. gazeto en Meksiko kaj salutas ĝin kiel signon de nova ekfloro de nia movado en Meza Ameriko. Sed bedaŭrinde la nova gazeto enhavas multe da silaj, gramatikaj kaj preseraroj. Ni esperas plibonigon en sekv. n-oj.

L' ESPERANTO. Sept.

Kun raporto pri la Kongreso „Kia estas la ĝusta vojo“ de A. Alessio. 14 paĝoj estas okupitaj de oficialaj informoj de Federacio Esperantista Italiana.

THE BRITISH ESPERANTIST. Okt.

Raporto anglalingva pri la Brita Asocio por Akcelo de Sciencoj. Kroniko.

HISPANA ESPERANTISTO. Aŭg.-sept.

Kun mallonga raporto pri la XIII-a kaj diversaj literaturajoj.

NOVA TAGIĜO. Okt.

Ni represis el ĝi raporton pri Esperanto ĉe Ligo de Nacioj.

KATALUNA ESPERANTISTO. Okt.

Kun detala programo pri la IX-a Kongreso de KEF en Girona (15-17. okt.).

SUISIAN IDISTO. Okt.

EUGENIA. Barcelona. Sept.

## Anoncetoj.

MORTIS en Lyon, Francl., la 29. sept. s-o Soulier, honora profesoro de la Universitato, membro de la Medicina Akademio, honora prezidanto de Lyon'a Esp. Grupo.

PLUMDESEGNAĴOJ, motivoj de Praha ktp., proksimuma formato 17 : 25 cm, prezo 40-60 kĉ. Portretoj per karbo desegnitaj de 100-200 kĉ. (20 : 30 cm). Proponoj por esp. glumarkoj. — Georgo Bohutinsky, pentristo, Praha II, Palackeho nabrezi 1672-56 n.

ESPERANTISTOJ. La „Itala Esperantisto“, pro decido de la nacia lasta kongreso en Trento, ne plu aperis post la aŭgusta monato, kaj ĉiu, kiu volas la lastajn serojn, rapidu sendi kompletan serion de sia gazeto, ĵurnalo, aŭ 8 (ok) italiajn lirojn laŭ hodiaŭa monŝanĝo. — Libro estas ĉiam pretaj, se vi volas interŝanĝi. Oni interŝanĝas poŝmarkojn kaj korespondadas. — Adreso: Giolla, Ponte Seveso 50, Milano, Italio.

12 FOTOGRAFAĴOJ de la XIII-a por 36 ĉ. kronoj riceveblaj ĉe Jiri Frankenberg, del. UEA, Bytĉica u Ziliny, Slovakio.

PETO. Al s-o Solà, grupo „Aplech“ en Sabadell, Kokai Lajos, Josef Major en Budapeŝt, José Mariette en Hennenbont, Lozada, Kol. Esp. Soc. en Cucuta, kaj Villafranca, Arg. Esp. Soc. en Buenos Aires. Mi petis vin kelkafoje poŝte kaj ree petas vin nun bonvolu pagi aŭ resendi la menditajn kaj delonge senditajn verkojn pri Bulgario kaj Rusio. Mia nuna adreso: Ivan Krestanoff, Pirdop, Bulgario.

RUSAJ SAMIDEANOJ! Multaj hungaraj samideanoj ricevis de vi diversajn sendaĵojn, leterojn kaj poŝtkartojn kun la peto je respondo. Sed el Hungarujo estas neeble sendi ion al Ruslando; do pardonu, se vi NE ricevis respondon. Ni kore dankas pro la senditaj leteroj kaj esperantaĵoj. Espereble ni povos iam rekompenci ilin. (Ensendita de Hung. Esp. Servo.)

ESPERANTO-OFICEJO, Bremen, Kirchweg 61/l., Germanio, peras kaj prizorgas ĉiuspecajn aferojn kaj rilatojn: komercajn, informajn, interŝanĝajn ktp. Specialaĵoj: socialistaj kaj aliaj literaturaĵoj, poŝtkartoj, stampiloj, fotografaj, poŝtmarkoj. Horloĝoj — novargentaĵoj — teknikaj objektoj (precipe tranĉiloj, forkoj, kuleroj ktp.). H.EHLERS.

FILATELISTOJ. Ĵus aperintaj konstituciaj polaj poŝtmarkoj, belega eldono, same 30 diversaj antikvaj maloftaj poŝtmarkaj kompletoj de diversspecaj polaj pm.; same ukrainaj, Pejlura, rusaj jubileaj Romanoff, generalo Judenitŝ kontrabatalanto de bolŝevikoj, rusaj sovietaj kaj diversaj poŝtmarkoj de Litva Siodkova de generalo Zeligovskij. Liverado al seriozaj kolektantoj. La pago per respond-kuponoj, bankbiletoj aŭ per neuzitaj naciaj poŝtmarkoj. Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10.

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Johannes Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bildfl.) nur kun fraŭlinoj.

Lina Lillienblum, Tallinn, Estonio, Vladimirl 7-5, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj.

Petro Samokin, Rusio, Romny, Telegrafo, deziras korespondadi kun gesamideanoj per poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o B. Szepessy, Hungario, Miskolc, Arany J. u. 29, Interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo. — Por 100-200 poŝtmarkoj mi donas saman kvanton da hungaraj poŝtmarkoj aŭ povas rekompenci laŭ la valorigo de l' katalogoj Senf 1921, Michel 1920 (por eŭropaj poŝtmarkoj) kaj J. et T. 1920. Difektaj poŝtmarkoj estas maldezirataj. Unufoje sendi mi ne povas, sed nepre rekompencos ĉiujn sendantojn.

F-ino Elinjõ Gerõ, Budapeŝt VI, Kiraly-u. 47-II-16, deziras korespondadi kun gesamideanoj per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Karlo Zãldy, Budapeŝt IV, Deak Ferencz-u. 1-II (Pénzintézet központ) deziras korespondadi per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

25 gelnantoj de Esperanto en la X-a distrikta kaj 35 gelnantoj en IX-a grupo deziras korespondadi. Por entuziasmiĝi ilin, oni sendu adresojn al k-do Adalberto Schuller, IX. ker. Angyal-utca 18-1-17, Budapeŝt, Hung.

S-o Bela Juki, X. Hõlgy-u. 48, Budapeŝt, Hung., deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandaj fraŭlinoj kaj kun Japanio.

20-jara, gaja stiriano deziras korespondadi kun fraŭlinoj de la tuta mondo. Karl Schmidt, V. B. G., Krumpental apud Eisenerz, Stiro, Aŭstrio.

Ĉokolad-laboristo deziras korespondi kun kolegoj el ĉiuj landoj. Paŭlo Nath, Libera Urbo Danzig, Germ., Schmedegasse 26.

John Tew. Eyck-Hinkel deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj. 2520 Channing Way, Berkeley, Kalifornio.

Vicente Orlando, Santa Fé 77, Bahia Blanca, Argentino, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo, kaj korespondi pri ĉiuj temoj kun fraŭlinoj.

S-o M. Ohtani, 105, Kobal-ĉo, Kita-ku, Osaka, Japan., deziras korespondi kun lingvaj gelnantoj aŭ gelnantoj kaj komercistoj, per leteroj aŭ ilustr. poŝtkartoj. Kolektas geografiajn kartojn kaj interŝanĝas gazetojn aŭ librojn en Esperanto aŭ nacilingvo. Ankaŭ ŝatas versaĵojn.

Gelnantoj de la esp. kurso ĉe Osaka Siminkan (Urba Domo) deziras korespondi kun gelnantoj tutmondaj. Precipe bonakceptas leterojn aŭ poŝtkartojn ilustr. de ekstreme malproksimaj landoj. Rusoj, hispanoj, hindoj k. a. sendu al adreso: Esperanto-kurso, ĉe s-o M. Ohtani, 105, Kobal-ĉo, Kita-ku, Osaka, Japanujo.

Peter Klopffelsch, Düsseldorf, Germ., Ronsdorferstr. 81, korespondas per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kaj leteroj kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

S-o Teo Vreden, Neuhoferstr. 12 b, M'heim-Rheinlan, Germ., deziras korespondi per leteroj kun fraŭlinoj el ĉiuj landoj.

S-o Willy Preis, Düsseldorf, Germ., Friedenstr. 79, deziras korespondi kun ĉiulandaj s-anoj per poŝtkartoj ilustritaj.

S-o Kurt Strobel, Plauen i. V., Germ., Kniehohstrasse 44, deziras interŝanĝi poŝtkartojn (bfl.) kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Por 100-200 poŝtmarkoj de ĉiuj landoj mi resendus la saman nombron de Germanlando. S-o Jos. Krüsemann, Recklinghausen, Steinstr. 12, Germanio.

S-o Karl Koch, Plauen i. V., Germ., Viktoriastrasse 97, deziras interŝanĝi poŝtkartojn (bfl.) kun ĉiuj landoj.

S-ano Rud. Nawrot, Düsseldorf, Germ., Charlottenstr. 5, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj.

S-o Kurt Höfer, Plauen i. V., Germ., Topfmarkt 11, deziras interŝanĝi poŝtkartojn (bfl.), poŝtmarkojn kaj gazetojn kun ĉiuj landoj.

S-o Theo Meisen, Düsseldorf, Germ., Ellerstr. 155, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun la tuta mondo.

La Esperanto-klaso de s-o Neupert, Leipzig-M8., Germ., Wedellstr. 17, deziras korespondadi kun eksterlandaj esperantistoj.

Heinrich Rhein, Mainz a. Rh., Germ., Hopfengarten 4, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Hans Schwidrigoll, Wilhelmstr. 5, Oels, Silezio, Germ., deziras korespondadi per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

S-o Rudolf Hobitz, Parkstr. 2, Oels, Silezio, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, esp. sigelmorkojn kaj esp. gazetojn. Mi korespondas angle aŭ esperante.

## Monteys & Martinez, Barcelona (Hispl.)

Comercio 31-3-2.

Ni aĉetas je nia propra kalkulo kaj komizio germanajn kaj aŭstrajn komercaĵojn. Estas preferindaj la jenaj artikloj:

Malplenaj kverkbareloj. :: Kverk-lignaĵoj. Diamantoj kaj brilantoj. Oraj. Artikloj por aŭtomobiloj. :: Materialoj por aŭtomobil-kaleŝoj. :: Horloĝoj. Ledoj, silkaj ŝtrumpoj kaj ŝtrumpetoj por sinjorinoj kaj sinjoroj. :: Tolajoj kaj teksaĵoj. :: Vitraroj kaj tiel plu.

## Ŝtalo de Solingen

ĉiuspecaj ilaroj, bruligiloj, mezuriloj estas liverataj de speciala firmo

Reinh. Maier Ww., Freiburg i. Br. Klarastr. 1, Germ.

Eksporkatalogoj disponeblaj. En kelkaj landoj ni serĉas ankoraŭ reprezentantojn.

Unuakvalitaj fabrikaĵoj el

Dezirante starigi ĉe mi en Katalunujo (franclima hispana regiono) :: :: : oficejon de :: :: ::

## Reprezentoj por Esperanto

mi petas al ĉiuj firmoj kaj komercistaj esp. grupoj, bonvole transdoni al mi siajn reprezentantojn, sendante katalogojn, prezarojn kaj — se eble — specimenojn de novaj :: facile vendebaj komercaĵoj. :: Adresu: Konrado Doménech, Rambla Alvarez 12, 2-a etaĝo, :: :: Geron, Hispanlando. :: :: Nur korespondado en Esperanto.

## SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO, o o o o o  
o o o o o LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda ŝtelo, globo ktp.

Bibliaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj.

15 : 20 aŭ 29 : 39 cm @ dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidajoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo.

Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 3 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambioj de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee,  
HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!

## L' Esperanto

Monata ilustrita internacia revuo sub patronado de Itala Katedro de Esperanto.

Abono: 15 lirojn (8 francajn fr.)

(per poŝtmandato, ĉeko, respondkuponoj, aŭ en kiu ajn nacia mono, en rekomendita letero).

Direkcio:  
A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo).

Konstantaj rubrikoj de la Revuo dum 1921 (ĉiuj en E.):

Ĉefa artikolo. Gramatiko de Friula Lingvo. Esperanta Sinonimaro. Kiel oni fariĝas grafologoj? Rimoj kaj Versoj. Noveloj kaj Rakontoj. „Itala Animo“, diligentaj tradukaĵoj de verkoj de klasikaj italiaj aŭtoroj. Revuo de la Revuoj, interesplena rubriko, kiu per klaraj resumoj kolektas la plej notindajn sciindaĵojn aperintajn en la ĉefaj E. gazetoj de la mondo pri la plej diversaj temoj. „De Alpoj al la maro“, priskriboj de la urboj kaj de l' mirindaĵoj de Italulo. Esperantaj sciigoj. Recenzoj, korespondado, humoraĵoj ktp.

## Komercdomoj, Komercistoj, Reprezentantoj

uzu en via propra intereso la servojn de la

Komercista Esperanto Grupo Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14

kiu havas bonegajn rektajn rilatojn al gravaj germanaj firmoj kaj fabrikoj. Perado senkoste!

## Peresperanta propaganda parolado!

Per Esperanto tra 17 landoj.

Sep jaroj en Argentino.

Por orienti intereseulojn: ĉirkaŭ 120-lumbildoj pri jenaj temoj:

Vojaĝoj. — UEA-servoj. — Esperantujo. — Buenos Aires. — Argentinaj pejzaĝoj. — Popola vivo. — Kutimoj. — Specialaĵoj de terkultura kaj brutarkreskiga medio, de industrio, komenco, vivkondiĉoj kaj pliaj karakteroj :: :: :: izaj interesajoj. :: :: ::

Konferenckonferencperiodo: fino de oktobro kaj novembro.

Invitantoj partoprenos je la kostoj de ĉi tiu multekosta entrepreno per almenaŭ 500 germ. markoj el malaltvalutaj landoj, per duobla sumo al ceteraj landoj.

Por ĝustatempa organizado, urĝas tuja scilgo al:

L. Kelety, Szászsebes (Sebesul-Sasesc), Transsilvanio, Rumanujo.

## Legu, abonu kaj rekomendu

la plej bonan informilon pri novaj ŝtatoj de Eŭropo monatan

## Ĉeosl. Gazeton kun Nova Europo

internacia tribuno de malgrandaj nacioj

Abono por 10 numeroj:

Anglio 2 ŝilingoj, Aŭstrio 100 kronoj, Belgio 3 frankoj, Bulgario 24 levoj, Ĉeĥoslovakio 10 kĉ., Danio 2 kronoj, Estonio 10 markoj germ., Finnlando 25 markoj, Francio 3 frankoj, Germanio 12 markoj, Hispanio 6 pesetoj, Italio 5 liroj, Japanio 2 jenoj, Jugoslavio 6 dinaroj, Letonio, Litovio 10 markoj germ., Norvegio 2 kronoj, Pollio 150 markoj, Rumanio 12 levoj, Svedio 2 kronoj, Svisio 2 frankoj, Usono 50 cendoj, ceteraj landoj 2 frankoj svisaj, :: :: ::

Specimena numero kontraŭ 1 resp.-kup.

Administracio kaj redakcio: Praha II., Tešnov N-o 10, Ĉeĥoslovakio.

## MEKANIKA LIGNOTORNEJO

Emil Schwörer, Freiburg i. Br., Germ. Dreikönigstr. 47

eksportas lignajn biciklo-tenilojn glatajn kaj kanelitajn en plej bona kvalito kiel specialaĵojn al ĉiuj landoj.

Reproduktaj kaj originalaj specimenoj estas volonte sendataj.

Reprezentantoj serĉataj.